

Wilhelm Müller,

La gastejo

tradukita de Manfred Retzlaff

Al ejo de mortintoj
Survoje venis mi.
Mi pensis, ke mi restu
En tiu loko ĉi.

Vi verdaj mort-koronoj,
Ĉu vi invitas min
Post la migrad' ripozi
Nun je la tago-fin'?

Ĉu estas okupitaj
En tiu domo ĉi
Jam ĉiuj ĉambroj? Morte
Lacega estas mi.

Gastej' malkompatema,
Ĉu min rifuzas vi?
Migrad-bastono mia
Pluiru Vi kun mi!

*Traduko de la Germana poemo "Das Wirtshaus" de WILHELM MÜLLER (*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2007-01-29.*

MR-453-1 / Arg-804-1613 (2013-01-31 20:44:26)